


KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



La fabela birdo Simurg ebligas al ĉiu deziranto viziti la landon de fabeloj ...

Jurij Perevalov [LESNOJ, Ruslando]

2001

kiel vicprezidanto de UEA Renato Corsetti iĝis esperantisto
literatur-historiaj paĝoj — popolaj fabeloj
lirike — aforismoj — iom pri la proverboj — anekdotoj
anoncetoj — informoj — korespondu!

2

Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

La kovrilo de tiu kajero respegulas la temon de nia nova rubriko, dediĉitan al popola folkloro.

En tiu ĉi numero ni jaŭrigas rakonti pri tio, kiel niaj eminentuloj iĝis esperantistoj. Hodiaŭ nia gasto estas *Renato Corsetti*, vicprezidanto de UEA.

En nia ĉefa temo ni prezentas al vi *Julion Baghy* — unu el la plej famaj esperantaj verkistoj de la 20-a jarcento. Uzante la okazon la redakcio rekomendas al vi nepre konatiĝi kun la verkoj de J. Baghy.

Laŭ la propono de *Jelena Jaroŝenko* el urbo Volgodonsk, (Ruslando), ni lanĉas rubrikon en "K" — folkloro de diversaj popoloj. Al ni ŝajnas, ke tiu kampo estas ege vasta kaj fekunda, tial ni atendas de vi kontribuojn.

Iom lirika estas la paĝo 8. Ĝi prezentas poemeton de jam konata al vi nia aŭtoro *S.E.Bullo* el Italio kaj najbare debutas *Kirjakova Olga* el Ruslando.

Inter tradiciaj aforismoj kaj anekdotoj ni proponas solvi kelkajn taskojn pri la proverboj.

Ĉe la lasta paĝo vi trovos la frekvencan horaron de E-radioelsendoj.

Agrablan legadon !

Viaj DONACOJ por KOMENCANTO estas ĉiam bonvenaj. DANKON !

KOMENCANTO

2001 numero 1 // 8 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2001:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo \$11,
aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo: 100 rublej (za 8 nomerov v god) prostym poĉtovym perevodom na imja Kudrjavceva Viktora Vasильeviča:
620041, Ekaterinburg, a. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K"

La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loĝlokojn.

Ni havas tro malmulte da komencantoj!

Karaj amikoj! Per tiu ĉi historio ni daŭrigas serion de rakontoj de niaj eminentaj esperantistoj pri tio, kiel kaj kiam ili estis komencantoj. Hodiaŭ nia gasto estas vicprezidanto de Universala Esperanto Asocio Renato Corsetti.



Kiam mi estis 16-jara, mi partoprenis junularan tendaron en suda Germanio, apud vilaĝo, kies nomo estis Falkenštajn. Tiam mi estis lernanto de la germana, kaj tre fiera pri mia kapablo iom konversacii en la germana.

Iun tagon venis al la tendaro maljuna homo, kiu disdonis al la tendaranoj poŝtkartojn kun tekstoj, temantaj pri iu internacia lingvo: Esperanto.

Mi demandis la estron de la tendaro pri tiu homo, kaj la respondo estis: "Nu, li estas stultulo loĝanta apude". Tiam mi akceptis la respondon, sed mi ne forĵetis la poŝtkartojn.

Post kelkaj jaroj mi retrovis la poŝtkartojn kaj tuj poste vidis en librovendejo en Romo lernolibron de esperanto. Mi aĉetis ĝin kaj komencis memlerni.

Mi skribis al adreso indikata en tiu libro por havi pli da informoj, sed neniu respondis. Evidente la lernolibro estis malnova kaj la tie indikata Esperanto-centro ne plu ekzistis.

Post iom da tempo mi vidis en itallingva revuo, eldonata en la tiama Bulgario, ke la sama revuo estas ankaŭ eldonata en Esperanto. Tuj mi provis aboni ĝin kaj tio sukcesis. En tiu revuo finfine mi trovis la adreson de Itala Esperanto-Federacio.

Mi skribis al ili kaj de ili mi ricevis la adreson de la Roma Esperanto-Grupo. Ĉar la tuta procedo daŭris kelkajn jarojn, kiam mi la unuan fojon renkontis la romajn esperantistojn, mi rimarkis, ke mi jam konas Esperanton, kvankam mi ne kutimas paroli ĝin.

Bedaŭrinde en tiu tempo la romaj esperantistoj estis plejparte maljunaj. Mi demandis la nuran junulon tie, ĉu ekzistas junulara sekcio, kaj li senhonte mensogis ke jes. Serĉante ĉi tiun junularan sekcion, mi amikiĝis kun tiu junulo kaj restis en la movado.

Mi komencis paroleti Esperanton kaj kompreneti la movadon, kiam en la okcidenteŭropaj landoj komenciĝis studentaj ribeloj. Tiam amaseto da junaj esperantistoj komencis teoriumi pri Esperanto kaj klarigi, ke ĝi ne nur estas lingvo sed ankaŭ ilo por batali kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo.

Tio definitive kaptis min kaj konvinkis min resti en la movado. Fakte mi ne estis serĉanta movadon por la akuzativo, sed movadon kun sociaj ĉeloj, mondpliboniga.

Intertempe kompreneble mi komprenis, ke la realo de la movado estas multe pli komplika ol mi, kiel naiva komencanto, pensis. Mi komprenis ke homoj estas malsamaj, kaj ke ne ĉiuj interesiĝas pri batalo por pli justa mondo.

Mi iĝis pli maljuna kaj pli tolerema, sed mi ankoraŭ nun restas en E-medio ne pro tio ke ĉiuj substantivoj finiĝas per "-o", sed pro tio, ke Esperanto estas potenca ilo por egaleco inter popoloj, grandaj kaj malgrandaj.

Ne havu, tamen, la impreson, ke mi ne vivas en la normala esperantlingva komunumo. Mi havas edzinon kaj filojn, kun kiuj mi daŭre parolas en Esperanto. Mi partoprenas kongresojn, gvidas kursojn kaj pagas miajn kotizojn, laŭ la normala ŝablono por esperantistoj.

Al miaj komencantoj en miaj kursoj mi provas montri la vastecon de la agadoj eblaj en Esperantujo, kie ĉiu povas, se li deziras tion, trovi sian niĉon.

Nia problemo, kiel movado, estas fakte ke ni havas tro malmulte da komencantoj.

Amike al ĉiuj legantoj de ĉi-tiu revuo.

Renato Corsetti
UEA, vicprezidanto.

*Dankon pro la
indiko de la libro
por viaj
legantoj -
tro multe
multo multe*

Verkistoj de la 2-a periodo de esperanta literaturo

Julio Baghy



Karaj legantoj!

El la antaŭa numero de "K", vi jam scias, kiom da malfeliĉo, suferoj kaj perdoj postlasis kvin kruelaj militaj jaroj; kia terura bato iĝis tiuj jaroj ankaŭ por la esperantistaro, kiu perdis tiom da bonaj gvidantoj: la Majstron Zamenhof, Carlo Bourlet, rektoron Boirac kaj multmilojn de aliaj samideanoj.

"La unua mondmilito detruis multon, - skribis W. Auld, - sed - je granda surprizo de multaj personoj... ĝi ne sukcesis detru la Esperanto-movadon." Kaj kvankam dum la mondmilito preskaŭ ĉesis la verkado en Esperanto, baldaŭ post la milito denove laboris originalaj verkistoj kaj komenciĝis nova epoko de la esperanta literaturo.

Post la milito vaste konataj iĝas du grandaj talentoj el Hungarujo: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. Edmond Privat skribis pri ili: "Sub ilia plumo la lingvo fariĝis vere potenca esprimilo." Ĉirkaŭ tiu ĉi du eminentaj verkistoj kaj literatura revuo "Literatura Mondo" fondiĝis la Budapeŝta "skolo". Sur la vicaj literatur-historiaj paĝoj de nia gazeto ni pli detale konatigos vin, karaj amikoj, kun la vivo kaj literatura agado de tiuj du talentoj.

Talento de Julio Baghy estis tre multflanka: li estis aktoro, reĝisoro, verkisto, poeto, lingvoinstruisto, akademiano. Li naskiĝis en 1891, lia patro estis drama aktoro, la patrino - teatra sufloristino.

Ankaŭ Baghy mem elektis aktoran profesion, ĝis la 1915-a li talente ludis en diversaj teatroj. Ankoraŭ dum la junaĝo multaj liaj poemoj kaj noveloj hungarlingvaj aperis en hungaraj gazetoj. En 1911 J. Baghy konatiĝis kun Esperanto kaj aliĝis al E-Movado.

Lian aktoran karieron rompis la unua mondmilito. En januaro de 1915 li devis soldatiĝi, en septembro 1915, apud Luck, li malsaniĝis kaj malsana trafis en rusan militkaptitecon, kie li pasigis ses jarojn. Ampleksa E-agado de Baghy jam komenciĝis en la siberiaj militkaptitejoj: ĉi-tie, en la multlingva societo, li gvidis kursojn, redaktis gazeton, aranĝis teatrajn prezentadojn, kies tekstojn ofte li mem verkis. La spertojn de tiuj jaroj li detale priskribis en siaj romanoj: "Viktimoj", "Sur sanga tero", "La verda koro".

En la fino de 1920 Baghy revenis post la milito al Hungarujo kaj fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de E-movado: gvidis kursojn, fondis klubojn, vojaĝis kiel Ĉseh-instruisto, verkis al pluraj eksterlandaj gazetoj. En 1921 li fondis unikan en sia tempo Esperanto Rondon Amikan, (ERA) — intiman amikan kulturrondon kun viglaj kunvenoj, literaturaj vesperoj, kun Viva Gazeto.

En 1922 kune kun Teodoro Schwartz kaj K.Kalocsay li fondis la faman gazeton "Literatura Mondo", kiu baldaŭ iĝis centro de tiama Esperanta mondkulturo. J. Baghy ofte estis invitita por gvidi kursojn, fari prelegojn, vigligi la movadon en multaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Anglio, Germanio, Estonio, Svedio ktp. Dum multaj Universalaj kongresoj li estis aktoro kaj reĝisoro de la kongresaj teatraĵoj.

J. Baghy verkis en multaj ĝenroj: poezio, romanoj, noveloj, dramo. Lia unua poemaro aperis en 1922 "Preter la vivo", sekvis la poemaro "Pili-grimo" en 1926, "Migranta plumo" en 1929, "La vagabondo kantas" en 1933. Liaj poeziaj materialoj venas grandparte el liaj spertoj dum la siberia mil-

itkaptiteco, el la kompato al la suferantoj, abomeno al la milito, protesta sento kontraŭ sociaj maljustaĵoj. Al lia liro ne estas fremdaj ankaŭ la kantado de amo aŭ ŝerca subtono. En 1966 aperis "Ĉielarko", versa reverko de fabeloj de dekdu popoloj. Per siaj poemoj li portis en nian literaturon novan, freŝan tonon kaj majstran lingvouzon.

Krea talento de J. Baghy eminentas en la romanoj. Li verkis romanojn: "Viktimoj" en 1925, kiel daŭrigo sekvis "Sur sanga tero" en 1933, kiuj rakontis la tristan romantikon de la militkaptiteja vivo.

Baghy montras, ke ne nur la suferantoj, sed ankaŭ la suferigantoj iĝas viktimoj kiam malhomecaj aŭ ideologiaj cirkonstancoj kaŭzas krueliĝon de homo al homo. La plej granda, 466-paĝa romano "Hura" aperis en 1930, ĝi estas unuflanke socia satiro, aliflanke - romantika utopio pri socio pli bona. "Hura" estas skribita en dialoga stilo kaj dialogoj ofte havas filozofian karakteron. (Sube vi povas ĝui fragmenton el tiu verko).

J. Baghy **HURA** (fragmento)

Ĉu vi scias, kial hodiaŭ regas malespero, nigra pesimismo? Ĉu vi konjektas, kial miloj da vulturhomoj furiozante venenas la mondon kaj kial al la nuna generacio mankas la necesa rezistpovo? Ĉar la socio degradis la homon en la Homo. La ido de hundo restas hundo dum sia tuta ekzisto, sed la idon de la Homo oni tuj nomas germano, franco, japano, negro kaj nur poste homo; oni edukas lin kaptolico, judo, mahometano kaj nur poste homo; oni distingas lin laboristo, burĝo, aristokrato kaj nur poste homo. Ĉio antaŭe kaj nur poste homo!

Nemirinde, ke sub la terura ŝarĝo de mil balastoj la Homo naniĝas kaj li evidentigas nur en suferoj kaj morto. Kiel la mono povas feliĉigi la homon, tiel same la nacio, eklezio, klaso, politiko ne povas savi lin. Nur la Homo povas savi la homon. Nur nova kulto, *la kulto pri la Homo*, povas redoni al la homaro la perditan paradizon. Tutkore mi sopiras la alvenon de la Homokulturo, ĉar ĝi gvidos nin el la marĉo, plenplena de kadavroj sociaj, religiaj, politikaj. Tutanime mi deziras kaj vokas la triumfon de la Homo-kulturo, ĉar ĝi estas la ponto, kunliganta Teron kaj Ĉielon...

“La Verda Koro” (1937) - estas ĉarma rakonto el rememoroj ankaŭ de Siberia militkaptiteco, skribita laŭ la plej facila maniero, la ĉapitroj estas laŭgrade komponitaj lecionoj, uzablaj por komencaj kursoj. “Verdaj Donkiĥotoj” (1933) kaj “La teatra korbo” (1934) entenas rememoraĵojn el lia infanaĝo kaj konfesojn pri la homo kaj verkisto.

Baghy ankaŭ multe okupiĝis pri la demandoj de la E-teatro, li mem verkis plurajn unuaktaĵojn, el kiuj kvin aperis en la libro “En maskobalo” (1977). Lia teatra ĉefverko estas triakta lirika dramo “Sonĝe sub Pomarbo” (1958) - ĝi estas fantazia dram-poemo.

En-tute, aperis de Baghy 18 libroj. Li estas internacie la plej ŝatata verkisto; liaj verkoj estas tradukitaj al dek tri lingvoj: franca, germana, ĉina, hispana, hungara, estona, finna, japana, kataluna, latva, nederlanda, rusa, sveda.

Dum pluraj jaroj la verkiston turmentis kronika malsano. “... Li nove kaj denove pasigis semajnojn kaj ĉe monatojn en hospitalo de lia granda verkisto-frato, K. Kalocsay. La kompatado de la esperantistoj montriĝis laŭ vere kortuŝa maniero; kiun povas krei nur la pura amo al la paĉjo de tuta Esperanto: el ĉiu parto de la mondo li ricevis medikamentojn,

Li, kiu... neniam kaj neniun tedis per peto kaj pretendo,” — tiel priskribis la lastajn jarojn de lia vivo S. Szahmari. J. Baghy mortis en 1967, jam post lia morto, en 1970, sub titolo “Aŭtuna foliaro” aperis elektaĵo el Baghy-poemoj.

Iam J. Baghy diris: “Esti esperantisto signifas ne nuran lingvoscion. Ĝi estas destino. Misio. Sapiro al pli bona mondo. Vera esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas, kaj li estas esperantisto jam antaŭ ol li lernas la lingvon.” Tiu esperantisto li estis mem, kaj oferis sian tutan vivon kaj tempon por Esperanto.. Kaj la verkoj de Julio Baghy daŭre vivas, estas legataj kaj amataj.

Julio Baghy

Kanto de l' vagabondo

Vagabond' de l' mondo estas mi,
vaganta sur la ter'.

En animo regas harmoni'
kun ĝojo kaj esper'.

Se trompas min la sortfavor',
perfidas amatin'?

vagabond' de l' mondo en la kor'
mi restos ĝis la fin.

El “Printempo en la aŭtuno”

Julio Baghy

Aŭtuno. La verda laŭbo flaviĝas. Prujnomorditaj folioj falas. Sed la suno ankoraŭ varme ridetas tra la fenestro. Ĝi mensogas printempon al la floretoj, sendore pompantaj sur la tablo. Ĉu nur al la floretoj? Ne! Al ĉiu. Ankaŭ al vi, ankaŭ al mi. La sunradioj ŝtelas sian en la korojn, varmigas ilin per printempaj rememoroj dum la prujnovesta aŭtuno.

Aŭtuno. Inter miaj brunaj haroj jam ekbrilas kelkaj arĝentaj. La rozojn de la vangoj velkigas la aŭtuno: la zorgoplena vivo. Prujnomorditaj revoj falas: la revoj de la animo... Sed en mia koro ankoraŭ varme radias la suno: la amo. Ĝi donas printempan iluzion por miaj geamatoj. Ĉu sole por ili? Ne! Ankaŭ por vi, ankaŭ por mi. La varmo de la amo karesas la lacajn animojn, donacas al ili sunoromitajn revojn de la printempo.

Kaj printempo ridetas en la aŭtuno; la okuloj fariĝas pri brilaj. Naiva optimismo lulas la korojn. La maljunulo denove vidas sin junulo, pardonas la senpripensemton de la juneco; la junulo kun pia komprenemo rigardas la blankharulojn. Jes, jes! Ĉio ĉi enestas en la historieto de dolĉe melankolia renkonto, ĉar ni ĉiuj jam renkontis la printempon, kiu kisis neforgeseblajn rememorojn je la koro.

Larma rideto de mia revteksanta koro estas tiu ĉi rakonto. Ame akceptu ĝin, ĉar ame ĝi estas dediĉata al vi.



Nalla Sadretdinova, [TAŜKENTO, Uzbekistano]

Jaroŝenko Jelena

[VOLGODONSK, Ruslando]

"... al mi ŝajnas jam delonge, ke en KOMENCANTO forestas paĝo de rusa folkloro, ĉu ne? Tiu paĝo estus certe interesa por alilandaj legantoj, sed por la niaj - faciligas leksikon por memorfiksi."

La redakcio plene konsentas kun nia fidela leganto *Jaroŝenko Jelena* kaj aldonas, ke ne nur rusa, sed ankaŭ ĉies folkloro estas tre taŭga kaj bonvena al KOMENCANTO, ĉar ĝi estas internacia gazeto.

Bonvolu traduki kaj sendi al "K" viajn popolajn fabelojn, tradiciojn kaj tiel p

POPOLAJ

*Hinda fabelo***La rompita poto:**

Esperantigis el la rusa

Sajtgarajev V.

[Insulo SAĤALIN, Ruslando]

Vivis iam braĥmano, tiom avara, ke oni nomis lin: *Svabavakripana - de naturo avara*. Li iradis de domo al domo — la almozon petis. Li jam varbis poton de rizo, plenan ĝis supre, manĝis, sed la rizo tamen multe restis, ĝis randoj. La braĥmano starigis la poton sur breton super sia lito, kaj vespere enlitiĝis, sed ne ekdormis — rigardis al la poto kaj pensis.

Ĝuste ĝis randoj estas plena la poto per rizo. Oh, se nun malsato venus al la popolo! Mi vendus rizon kontraŭ cent rupioj. Kaj el cent rupioj mi aĉetos kapron kaj kaprinon kaj havos de ili plenan gregon de kapridoj. Mi vendos la kapridojn kaj aĉetos bovinojn. Bovinoj naskos bovidojn kaj mi vendos ilin kaj aĉetos bubalojn kaj poste ĉevalinojn. Ĉevalinoj elkreskos kaj mi havos la amason da ĉevaloj. Mi vendos ĉevalojn — estos multe da oro!

Tiam mi konstruos domon belegan, edziĝos je filino de riĉa braĥmano kaj prenos grandan doton. Ĉe ni naskiĝos filo kaj mi nomos lin Somaŝarma. Kiam li kreskos tiel, ke oni povos balanci lin sur la femuroj, mi sidos apud la ĉevalo kun libro. Ekvidos min la filo, ekkuros al mi preter la ĉevaloj, mi ektimos — kiel ajn ĉevalo ne batu lin per hufo! — kaj ekkrios al la adzino: "Prenu la infanon, prenu!" Nu, kaj ŝi estos okupata per io ajn kaj ne aŭdos. Tiam mi stariĝos kaj batos la edzinon forte per la piedo...

Kaj tiumomente la avarulo frapas per piedo la poton! La tuta rizo elŝutiĝis sur la lito, kaj la braĥmano fariĝis blanka pro la riza polvo.

Tial en Hindio oni diras: "Kiam kiu enpensiĝas kaj komencas revii pri tio, kio povos esti — *estu li blanka kiel patro de Somaŝarma*." Kaj oni ripetas tiun popoldiron jam dum du mil jaroj, aŭ eĉ multe pli, ĉar kiu povas atesti, kiam oni diris tion por la unua fojo?

Estas konata fakto: pri patro de Somaŝarma, la knabo, kiu neniam ekzistis, oni scias en ĉiuj anguloj de granda Hindio.

**Bill Thorne**, [LONDONO, Anglio]

FABELOJ

Kompilis kaj prilaboris la rusajn popolajn fabelojn

Alekseo N. Tolstoj

Esperantigis **Jaroŝenko Jelena**

[VOLGODONSK, Ruslando]

La rapeto

Plantis foje avo rapeton kaj diras:

— Kresku, kresku, la rapeto, trodolĉa!

Kresku, kresku la rapeto fortika!

Elkreskis la rapeto trodolĉa, fortika, granda-grandega.

Iris la avo por la rapeton eltiri:

tiras-tiradas, eltiri ne povas.

Vokis la avo la avinon.

La avino post la avo,

La avo al la rapeto -

Tiras-tiradas, eltiri ne povas.

Vokis la avino la nepinon.

La nepino post l' avino,

La avino post la avo,

La avo al la rapeto -

Tiras-tiradas - eltiri ne povas.

Vokis la nepino la hundon Ĵuĉko-n

Ĵuĉko post la nepino,

La nepino post la avino,

La avino post la avo,

La avo al la rapeto -

Tiras-tiradas, eltiri ne povas.

Vokis Ĵuĉka katinon

La katino post Ĵuĉka,

Ĵuĉka post la nepino,

La nepino post la avino,

La avino post la avo,

La avo al la rapeto.

Tiras-turadas, eltiri ne povas.

Vokis la katino museton

La museto post la katino,

La katino post Ĵuĉka,

Ĵuĉka post la nepino,

La nepino post la avino,

La avino post la avo,

La avo al la rapeto -

Tiras-tiradas — eltiris la rapeton!



Nina Vinnikova, [NOVOALTAJSK, Ruslando]

Esperantigis **Zueva Margarita**

[MOSKVO, Ruslando]

Tajska fabelo

Babilema birdeto

Vivis unu malgranda birdeto kun laŭta voĉo. Oni nomis ĝin “Ĉi tio estas mia”, ĉar, flugante super kampoj kaj riveroj, ĝi ĉiam kriis : - “Ĉi tio estas mia, ĉi tio estas mia”.

Foje la birdeto trovis arbon, kovritan per maturaj kaj maturiĝantaj fruktoj. Ili estis tiom multaj, ke ĝi ne povis ilin beki eĉ dum la jaro. Apud la arbo ne estis eĉ unu birdo.

La birdeto admiris tiun trovaĵon kaj sidiĝis sur la arbon. Ĝi saltis tra la branĉoj, bekis la fruktojn tie kaj ĉi-tie, kaj rapide ĝi satiĝis. Sed ĝi tre timis, ke aliaj birdoj trovos la arbon kaj ankaŭ ekvolos frandi bongustajn fruktojn. Kaj ĝi akre ekkriis: “Ĉi tio estas mia, ĉi tio estas mia!” Ĝi kriis tiel laŭte, ke ĉiuj birdoj aŭdis ĝin kaj kunflugis rigardi, kio okazis. Ili ekvidis belegajn sukriĉajn fruktojn, tuj forbekis ilin kaj forflugis.

Kaj la kompatinda malgranda birdeto la tutan tempon kuŝas apud sia arbo kaj kriis:

— Ĉi tio estas mia, ĉi tio estas mia!

Esperantigis kaj pentris
Kirjakova Olga
[ORENBURG, Ruslando]

Ĉevaloj en ora suno



Mi kaj mia aĝa frato estis ĉe la avino en la vilaĝo, somere.

Foje matene ni iris fiŝi. Ni iris al la rivero, eksidis sur la bordon, sed mi ne fiŝis, mi rigardis sur la alian bordon — tie knaboj lavis ĉevalojn. Ili lavis, surĉevaliĝis kaj rajdis sur la ĉevaloj. En tiu tempo aperis suno!

Estis tiel bele: ĉevaloj en ora suno!

Ili kuradis apenaŭ tuŝante la teron per gamboj. Iliaj haroj disblovdas per vento ĉien kaj ŝajnis orkoloraj

Mi estis admirita, sed la ĉevaloj estis jam malproksime.

Akvario

Verkis kaj pentris **Santi Elena Bullo**,
[MESTRE, Italio]

Malgrandaj strangaj fiŝoj
en la doma akvario,
naĝas inter ombroj
je nereaj konstruaĵoj.

Cedemaj ili kaptitoj
per malkonkerebla fortreso
el vitro kaj akvo
al niaj fundaj revoj.

Subrigardas malice flegma
malgranda kato kuŝata
sur la doma malnova tapiŝo.



Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

AFORISMOJ

Kolektis kaj esperantigis

Hussein Amii

[LONDONO, Anglio]

Instinkto estas la nazo de la menso

*

Maltrankvilo en homa vivo estas same kiel grinco kaj muelaĵo en maŝinoj kiam mankas al ili oleo. En la vivo, fido estas tiu oleo

*

Reguloj por vojaĝantoj estas: kunporti prudenton, forlasi antaŭjuĝojn

*

En aferoj de amo ĉiu tago estas pago-tago

*

Poezio estas la taglibro de mara besto, kiu loĝas sur tero kaj aspiras flugi en la aeron

*

Vi plenaĝas nur kiam vi komencas ridi - pri vi mem.

* * *

Makarenko Valery

[TVERJ, Ruslando]

Scii multajn lingvojn signifas havi multajn ŝlosilojn por unu seruro

*

{Voltero}

Racio pli ofte venkas ol mono

{Sofoklo}

*

Nova vereco plej multe suferas de olda eraro.

{Gjote}

*

Eĉ plej saĝaj filozofoj ne kapablas respondi je stultaj demandoj

{Ĥilino}

* * *

Zueva Margarita

[MOSKVO, Ruslando]

Malkonfido al si mem estas kialo de plimulto de niaj malsukcesoj

{K.Bouvi}

*

La unua paŝo estas malfacila, kaj la unua vojo — enua

{Saljeri}

*

Kie ne estas volo — mankas ankaŭ la vojo

{Bernard Ŝou}

*

Grandaj probablecoj venas al ĉiuj, sed multaj personoj eĉ ne scias, ke kun ili renkontiĝis

{U.Danning}

*

Lamanta laŭ rekta vojo, plifruos kŭirantan, kiu devojiĝis

{Bekon}

mia kato
ŝatas ludi.



Bill Thorne

[LONDONO, Anglio]

Jakovleva Elena

[ARĤANGELSK, Ruslando]

Frazoj de Kozjma Prutkov

Kion dizos pri vi la aliaj, se vi mem pri vi mem nenion dizos?

Sinoĝezo estas celo por kuglo de ĉiu paŝisto

La unua paŝo de infano estas paŝo al lia morto

Malplena bazelo de Diogeno havas ankaŭ sian pezon en historio de homaro.

Kie estas komenco de tiu fino, kiu fin(ig)as komencon.

* *

*

El popola cerbo venas la proverbo

Ekde la unuaj jaroj de la apero de nia lingvo dank'al ĝia poetikeco aperis multaj proverboj, foje analogoj de la jam ekzistantaj ĉe diversaj popoloj, foje plene originalaj. En "K" aperas proverboj, kiujn kolektas kaj sendas al ni niaj legantoj.

Hodiaŭ ni proponas al vi vortajn ludojn kaj enigmojn ligitajn kun proverboj.

Sube vi trovos la unuajn partojn de la konataj kaj tute novaj proverboj. Via tasko estas elpensi, verki la duan parton. Se la proverbo estas jam bone konata, ne necesas ĝin aŭtentigi, sed preferindas verki iun sian varianton. Aŭ eĉ kelkajn.

Finverku la proverbojn

Ekzemple:

Sen laboro ne venas oro

variante:

Sen laboro enuas koro

Sen laboro ne venas honoro

—

Bela vizaĝo sen multa saĝo

variantoj:

Bela vizaĝo similas al miraĝo

Bela vizaĝo - bona avantaĝo

Bela vizaĝo - la kovrila paĝo

Ne doloras frapo ...

Ne ŝovu nazon en ...

Tempo estas valoro ...

La dormo estas bona ...

Kiu frue leviĝas ...

Inter generaloj ...

Ŝatata laboro estas ...

Komenco bona ...

Vigla saĝo ...

Al ĉiu besto ...



Svetlana Naumoviĉ. [TJUMENO, Ruslando]

Trovu la kaŝitan proverbon

Antaŭ vi estas tri tabeloj. En ĉiu tabelo estas kaŝita unu proverbo. La proverboj estas sufiĉe konataj. La literoj sinsekvas unu post la alia, neniam kruciĝante. Inter la vortoj ne estas indikitaj distancoj, (t.e. senliteraj kvadratoj) por ne tuj diveni la vortojn. Gravas difini la komencan literon, poste la direktoj povas esti diversaj: dekstren, liven, suben, supren ... Gravas, ke ĉiu litero uzeblas nur unufoje.

t	a	l	o	j
a	r	a	l	o
b	e	n	t	j
i	n	i	e	p
r	e	g	r	a
p	u	l	o	r

z	a	n	u	v
o	v	n	a	o
n	a	n	d	ŝ
e	z	o	m	e
n	f	r	e	n

ĉ	e	b	o	t
l	o	t	s	i
a	ŝ	u	o	ĉ
s	e	m	a	i
t	a	s	k	u
n	t	r	u	o

Karaj amikoj!

Ni atendas viajn solvojn! Estu aktivaj! Viaj variantoj kun viaj nomoj nepre aperos en "K"!



Kolektis **Hussein Amill**
Esperantigis
Hussein Amill kaj Bill Thorne

Kliento al vendisto de uzitaj aŭtoj:

— Mi ŝatus aŭton, kiu iras tiel glate,
kiel vi parolas.

Genealogo al mildaspekta ulo:

— Ni trovis viajn pragepatrojn. Kostos
tri mil pundojn, via reĝa moŝto

Bona rido

el la libro "Bona rido" eldonita en Svedio 1965

Amu vian malamikon

La pastro al la nereformeblulo:

— Vi ja scias, ke alkoholo estas via la plej
danĝera malamiko!

— Jes, sed estas skribite, ke oni devas ami
sian malamikon.

— Jes, vere, ami, sed ne engluti!

Danĝere

— Mi devas ĉesigi la drinkadon, ĉar estante
ebria, mi ĉirkaŭiras, pagante ŝuldojn faritajn,
kiam mi estis sobra.

Neniu risko

— Amata Adriano, ni ne povas geedziĝi!
Pensu, ĉi-nokte paĉjo forludis la tutan mian
doton

— Trankviliĝu, Greto, trankviliĝu! Estas mi,
kiu ludis kontraŭ li.

Zujeva Margarita

{MOSKVO, Ruslando}

— Kial vi nenion faras?

— Nun estas vintro, tagoj estas tiom kurtaj,
ke nenion indas eĉ komenci.

Rumjancev Jurij

[ZAREĈNY, Ruslando]

— Petro! Diru por la gastoj toston.

— Tosto...

— Ne tiel. Longan.

— Tooooosto.

Rudolf Zoldoŝ

[KANJIZA, Jugoslavio]

— Ĉu vi scias, kial estas tiom multaj aŭtaj
akcidentoj sur la ŝoseoj?

— Ne.

— Ĉar hodiaŭaj ŝoforoj kun morgaŭa rapideco
veturas sur hieraŭaj vojoj.

-- Kiel finiĝis via romano, pri kiu ni antaŭ jaro
interparolis?

— Tragedie.

— ?

— Ĉar neniu volis ĝin eldoni.

Profesoro deziras konkretiĝi kun la studentoj
pri la ĝusta formo kaj dimensioj de la terglobo.

— Diru al mi, se mi tie ĉi, en la ĉambro-mezo
komencos fosi, kien mi trafos?

— Rekte en frenezejon! - estis respondo.



Jurij Pervalov, [LESNOJ, Ruslando]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Jurij Perevalov

Mi kaj mia filino Olesja volas trovi amikojn tutmonde.
Interesoj: dekoraj artoj, literaturo ks

pk 252 (por Cvetkov)
LESNOJ, 624200,
Ruslando

Angel Gabriel

Ferranc
korespondi tutmonde

Calle 16. No. 215
apto 2 esg. A17. Vedado.
C.P.10400
HAVANO

Kubo

Jean-Cristophe Badiate

Prezidanto de malgranda E-grupo en Dakar. Gastiganto de Pasporta servo.

Parcelles Assainies,
B.P. 26464
DAKAR

Senegalo

s-ro Asif Visca

Mi estas 48 jara esp-isto, dez. kor. (ankaŭ kun Kazafstan), interesiĝas pri literaturo, muziko, diversaj kulturoj kaj turismoj.

Sondre Skogveien 89,
N - 5056, BERGEN


Norvegio

s-ro Tatet Guy

anoj de nia grupeto dez. kor. Tutmonde pri diversaj temoj

M.F.Av. St. Gilbert
2, Hameau du Deffend
FR 03110
ST. DIDIER LA FORET

Francio



Esperanto en radio

tempo	Nomo de stacio	frekvencoj khz	direkto
-------	----------------	----------------	---------

Ciutagaj elsendoj

11.00-11.27	Ĉina Rad. Int.	7170, 7150	Azio Orienta, Japanio
13.00-13.27	Ĉina Rad. Int.	11650, 11840	Azio Sudorienta
14.30-15.00	Pola Rad. Vars.	7285, 7275	Eŭropo
19.00-19.30	Pola Rad. Vars.	7130	Eŭropo
20.00-20.27	Ĉina Rad. Int.	7265, 9963	Eŭropo
22.30-22.57	Ĉina Rad. Int.	9860, 11700	Ameriko Latina
00.00/24.00	Pola Rad. Int.	(adreso sube)	WWW // TTT

Dimanĉaj elsendoj

07.00-07.30	Rad. Hav. Kubo	9820	Azic Pacifika, N. Ameriko
15.00-15.30	Rad. Hav. Kubo	11760	Ameriko, Karibio
19.30-20.00	Rad. Hav. Kubo	13750, 13710	Eŭropo, Mediteraneo
20.20-20.30	Rad. Vatikana	527, 1530	Eŭropo
20.20-20.30	Rad. Vatikana	(adreso sube)	WWW // TTT
21.30-21.55	Rad. Aŭstria Int.	6155, 5945	Eŭropo
21.30-21.55	Rad. Aŭstria Int.	13730	Aŭstrio Norda
22.00-22.30	Rad. Hav. Kubo	13750, 13715	Eŭropo, Mediteraneo
22.50-22.59	Rad. Vatikana	527, 1530	Eŭropo
23.30-24.00	Rad. Hav. Kubo	11760, 9505	Ameriko, Karibio

horoj laŭ UTC; UTC = MET - 1 h (vintre) ŝanĝiĝos ekde 25 marto 2001

UTC = Universala Tempa Koordinato (Grinviĉo) MET = Mezeŭropa Tempo

Rad. Vatikana = Radio Vatikana http://www.vatican.va/news_services/radio

Pola Rad. Vars. = Pola Radio. Varsovio; <http://www.radio.com.pl/polski/esperado/es.asp>

Ĉina Rad. Int. = Ĉina Radio Internacia; <http://www.cri.com.cn/>

Rad. Hav. Kubo = Radio Havano Kubo <http://www.radiohc.org/>

Rad. Aŭstria Int. = Radio Aŭstria Internacia <http://rri.orf.at/esperanto/welcome.html>

Jeff Thacker

34 jara malliberulo, ŝatas korespondi por plibonigi sian Esperanton. Interesiĝas pri sciencoj kaj ŝatas legi.

P.O.Box 456,
Independence, CA 93526
Usono

Elena Jakovleva

28 jara, volas korespondi tutmonde

Partizanskaja
51-1-196,
ARHANGELSK
163059

Ruslando

Bhabani Charan Das

Korespondi en bona Esperanto pri vojaĝoj

Flat No. 2A,
Udchi Housing Complex
Townguard Road, Ghorir
Morh, Chinsurah, Hooghly,
- 712101

Hindio

Esperanto — klubo

12 jaraj e-klubanoj interesiĝas pri proverboj kaj frazaj situaci-komparoj en diversaj lingvoj.

College Louis Pasteur
48 Bd. Paul Claudel,
FR-13009, MARSEILLE

Francio

s-ro Alberto Babiŝta

1932 ja., interŝanĝas leterojn kaj bildkartojn

Av. Nevic Baracho
42 Bela Vista
BR-12.209-020
JOSE dos CAMPOS - SP

Brazilo

Viaj donacoj por KOMENCANTO
estas ĉiam bonvenaj. Dankon!

